Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe [Facebook] kaj [Twitter].

# tejo:aktuale

n°478 | Novembro 2022





Okaze de la Zamenhofa Tago, ni invitas vin kontribui al filmeto de TEJO. La temo ĉi-jare estas **“Bonaj Novaĵoj”**, do ne hezitu rakonti al Esperantujo pri viaj atingoj, ĝojoj, sukcesoj de 2022...! Por pli da detaloj pri kiel kontribui, [vizitu nian retejon].




Ni ĝojas anonci ke la individuaj membroj de TEJO elektis ĉiujn el la tri kandidatoj por **komitatanoj B**. La novaj komitatanoj B estas **Wojciech "Wojtek" Oreszczuk**, **Joshua Moss (Josuo Marso)** kaj **Espoir Ngoma Kasati**. Ili ekoficos en la Komitato la 1-an de decembro 2022 ĝis novembro 2024. **Gratulon al ili kaj sukceson!**




**Kundividu la "golojn" de via landa sekcio dum 2022!** Afiŝu pri via partoprenado dum Retoso, pri fizikaj kaj virtualaj renkontiĝoj, pri partoprenado dum eventoj de aliaj sekcioj... Uzu ĉiam la kadrovorton #niasekciogolas kaj TEJO kunhavigos la golojn!




La komisiono pri Scienco de TEJO lanĉas **serion de pensigaj demandoj pri scienco**. Respondu al la formularo per viaj pripensoj skribe aŭ, se vi estas kreema homo, vi ankaŭ rajtas kontribui per bildo, poemo, ŝerco, pentraĵo, video... per io ajn!




Post dumonata prilaborado de la Estraro, la Stabo, kaj membroj de komisionoj kaj interesgrupoj, **la** TEJO-Realigplano **por la estrara mandato 2022-2023 pretas**! La Realigplano gvidos la agadon de TEJO ekde septembro 2022 ĝis aŭgusto 2023.




**Invitu IJK-n 2024 en via lando!** Daŭrigu la longdaŭran tradicion de la plej granda kaj mojosa internacia evento de la mondo: la IJK! Ĉu vi ŝatus kunlabori kun TEJO por okazigi la IJK-n? **Anoncu vin!**


---

# Retoso 2022

**Retoso 2022** finfine kaj sukcese okazis pasintsemajne! Entute, **376 homoj aliĝis**, venis el **72 landoj**, kaj pli ol **50 programeroj** estis proponitaj. *Kaj vi, kio estis via plej ŝatata momento de la evento?*



Por tiuj, kiuj bedaŭrinde ne povis ĉeesti la eventon aŭ maltrafis prelegojn, multaj konferencoj spekteblas ĉe nia jutuba kanalo, @tejoesperanto! Se vi scivolas pri la *nova laborgrupo pri klimatŝanĝa tradukado* aŭ ŝatus aŭdi pli pri *Eksteraj Rilatoj de TEJO*..., nepre vizitu la kanalon!



La komisiono pri Scienco de TEJO kunlabore kun UEA kaj ILEI organizis **KonSciU**, por kuraĝigi junulojn uzi sciencan kaj fakan scion en Esperanto. **Tymoteusz Smoliński**, bakalaŭra studento pri kemio, gajnis la unuan premion. **Frank van Hertrooij** kaj **Abhinav Varma** gajnis la duan kaj trian premion.




Post la spertoj de Azio kaj Ameriko, okazis la **afrika Kontinenta Junulara Konferenco**. Junuloj el Madagaskaro, DR Kongo kaj Senegalo kundividis siajn ideojn, projektojn kaj esperojn kun samideanoj el la tuta mondo!







***June kaj Kune***, la muzikalo kiu premieris dum IJK ĉi-jare, estis registrita kaj fine montrita dum Retoso. Eblas nun spekti ĝin ĉe Jutubo, nepre ne maltrafu ĝin!


---

## Lastatempa agado

Ĉu vi jam konas la estraranojn de TEJO por la oficperiodo 2022-2023? Se ne, ekkonu ilin! Ili sinprezentas en la lasta epizodo de *Enmovade*, ĉe nia Jutuba kanalo.




Pasintsemajne, okazis la Ĝenerala Asembleo de **FoJE (Forumo Junulara Eŭropa)**, en kiu TEJO membras. La evento okazis en Tirana (Albanio) kaj du delegitoj de TEJO estis senditaj, inter aliaj reprezentantoj de la junularo en Eŭropo.






# Venontaj eventoj




La 23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj okazos de la **9-a ĝis la 11-a de decembro** en Bjalistoko (Pollando). Prelegoj, artaj programeroj estos senpage proponitaj. La sabata programo estos rete elsendata. Antaŭ kaj post la evento okazos internaciaj projektaj renkontiĝoj de Erasmus+.





Okazos ankaŭ en Bjalistoko trejnado pri redaktado kaj tradukado de Vikipedio la **11-a ĝis kaj la 12-a de decembro** kaj restas kelkaj lokoj por ĝenerala publiko! La tuta projekto estas organizita de Vikimedio EO kaj finance subtenita de la programo Erasmus+.




JES (Junulara Esperanto-Semajno) estas la dua plej granda junulara Esperanto-aranĝo. Ĉi-jare ĝi okazas jam la 13-an fojon, apud Oranienburg (Germanio) de la **28-a de decembro ĝis la 4-a de januaro**. Atendas vin agrabla tempo, renkontiĝoj kun interesaj homoj kaj unika etoso!

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**




---




**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**
Sendu viajn novaĵojn al **tejoaktuale@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato
Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Kontribuantoj de ĉi tiu numero:** Patricio Iglesias, Tyron Surmon

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) • tejo.org

*Kopirajto © 2022 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands